# *Esprimas Bukele ke Salvadoro multe devas lerni el Kubo.*



San Salvadoro, 3 jun (RHK) La elektita prezidento de Salvadoro, Nayib Bukele, esprimis ke Salvadoro devas multe lerni el Kubo, aparte pri temoj de publika sano.

Akceptinte la vicprezidantinon de la ?tata konsilantaro de Kubo, Gladys Bejerano, Bukele asertis ke la rilatoj de sia registaro kun Kubo, estos bazitaj en la reciproka evoluo kaj kunlaboro, dum Bejerano transdonis al li saluton de la kuba prezidento Miguel Díaz-Canel kun bondeziroj por la venontaj jaroj.

Kubo plu da?rigos siajn nunajn rilatojn kun Salvadoro samkiel la kunlaboron en la sferoj de edukado, sano, kulturo, sporto, medio kaj aliaj areoj de reciproka intereso.

Tiuj agadoj estis elstarigitaj de la eliranta ?tatestro Salvador Sánchez Cerén, kiu anka? renkonti?is dum sia lasta regad-tago kun la kuba vicprezidantino.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/192379-esprimas-bukele-ke-salvadoro-multe-devas-lerni-el-kubo

RADIO HABANA CUBA

# Radio Habana Cuba